FN PER ANC 47

Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL-TRIMONATA BULTENO

N°43 (nova serio) - N°128e - Marto 1978

REDAKTAS : Sino Pottier 21 allée des Roitelets 76190 YVETÔT.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

Eldonita de : La ESPERANTO-GRUPOJ de la RUENA REGIONO -

EKSPEDAS : Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE : ccp : 283.40 H. ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma Kotizo : 7,00 Fr. - Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al NORMANDA ESPERANTO BULTENO sen membreco: 7,00F.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj -"

# PRINTEMPA RENKONTIĜO

La 5a de Marto ,en Le Havre okazis la Printempa Kunveno , kaj , kvankam ni ne troviĝis en tiu verdema sezono , la suno ridetis al la 53 Gesamideanoj kiuj alvenis .

Ĉiam efikas ĝojige revidiĝi inter Normandoj : Duclair , Fecamp , Grand Quevilly , Lisieux, Rouen , Trouville , Yvetot ... jen punktoj de kie ili alvenis !

La aperitivo altiris al ni jurnalistoj ,kiel mielo altiras muŝojn... ilia foto aparato estis sendube tro malgranda por kapti la tutan anaron, tial nur kelkaj reprezentantoj aperis sur la bildo , en la gazetaro .

La surpriza manĝo "Paella" iom ne kongruas kun la kutimo de niaj senpretendaj kunmanĝoj , sed ĝi spertis sian sukceson .

Nia magiisto Ludovik regalis nin per siaj ĵongladoj kaj prestidi-tado ... Ĉu vi spektantoj lernis el tiuj demonstradoj ? Ni atendas vin sekvontfoje $

-Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais - DÉPOT LÉGAL 1er TRIMESTRE 1978 -
Le gérant : P. Lemarchand -

S-ro Chalm prezentis sian aùdvidan muntadon : Ni vojaĝis al la Kastelo de Grezilono kaj ni ankaù iom partoprenis en la reciprokaj vizitoj de la Grupoj de Southampton kaj Le Havre .

Se ne dancis la junuloj ,ne kulpis la manko de muziko,sed verŝajne nur la tro rapida fluo de l'tempo .

Fine ,jes ja venis rapide la horo de disiĝo , kun ĝis-revidaj salutoj, . . . Ĝis R O U E N 22an kaj 23an de Aprilo !

<u>Noto</u> : Supre oni parolas pri Southampton . Ni konfirmas la venontan viziton al tiu urbo : foriro el Le Havre vendredon la 15an de Septembro,vespere ; reveno dimanĉon vespere . Ne nur havranoj povos iri : Interesatoj informiĝu ĉe F-ino Sylvie CARON , 44 rue Gustave Lennier 76600 LE HAVRE

Komitato de H.E.G.

---

# GAZETELTRANĈAĴOJ

## Fête fraternelle des Espérantistes

Les espérantistes du Havre ont largement participé, dimanche salle François-Ier, à la fête annuelle du groupe qui réunissait également des délégués de Rouen, de Grand-Quevilly, de Lisieux, de Trouville, d'Yvetot et de Fécamp.

A l'heure apéritive, le président, M. Jean-Pierre Gibaux donna lecture de messages adressés aux espérantistes de Southampton et de Leningrad, villes européennes où des espérantistes du Havre se rendront bientôt.

Il annonça enfin que M. Chalm, l'un des responsables de la M.J.C. est tout spécialement chargé des relations des espérantistes entre les différents pays et que le congrès international aura lieu à Varna (Bulgarie) du 29 juillet au 3 août. Enfin, il donna des nouvelles d'un espérantiste havrais qui fait le tour du monde.

Après de fraternelles agapes M. Gibaux présenta une projection de diapositives prises au cours d'un voyage en Grande-Bretagne et Ludovik, espérantiste lui aussi se fit applaudir dans son tour de magie.

Pour terminer rappelons que les cours d'espéranto ont lieu chaque mardi à 19 h. 30 à la M.J.C. et le mercredi à 19 h. 30 au lycée Porte-Océane. Le Bureau de l'Association havraise est composé de M. Jean-Pierre Gibeaux, président ; Mlle Sylvie Caron, secrétaire et Mme Langlois, trésorière.

Tiu artikolo aperis kun foto la 7an de Marto 1978 en la ĵurnaloj "Havre Libre" "Le Havre-Presse" kaj "Le Progrès"

# KOMUNA ESTRAR-KUNSIDO DE UNUIĜO DE LA NORMANDAJ ESPERANTISTOJ KAJ NORMANDA FEDERACIO de U.F.E.

La estraroj de U.N.E. kaj de la Federacio komune kunvenis en Le Havre, Salle François Ier, la 5an de Marto 1978.

Ĉeestis la kunvenon S-roj QUILLAUD, GIBAUX, LEMARCHAND, TAILPIED kaj POTTIER. Tuj post la malfermo, je la 10a horo 15 S-ro Quillaud anoncis, ke li ricevis leteron de S-ro TEXIER, en kiu li petis ke li skribu al ambaŭ grupoj de Bordeaux ( S.A.T. kaj neŭtrala), por ke ili kunlaboru.

**ĜENERALA KUNVENO**

Ĝi okazos en la Junulargastejo de Rouen, la 22an kaj 23an de Aprilo 1978. La RUENANOJ okupiĝos pri la preparado de la manĝo. Estos ankaŭ eble vespermanĝi en la Junulargastejo, kaj la matenmanĝo estos enkalkulita en la prezo de la tranoktado S-ro Lemarchand kontaktis " TESPA" Kelkaj el;ĝiaj membroj venos kaj prezentos programon. S-ro Quillaud rezervigis 30 litojn por la Kongresanoj.

La laborkunsido komenciĝos je la 9a kaj 30, kaj estos komuna por U.N.E. kaj la Federacio, sed kompreneble nur la membroj de tiuj asocioj rajtos partopreni la balotojn

Elirantaj estraranoj de U.N.E. S-roj GIBAUX kaj QUILLAUD.

Elirantaj estraranoj de la Federacio Ni devos kontakti

~~Finon BONNET pri tio.~~

TEXIER kampanjo

Ŝajne neniu ĝis nun sukcesis vendi enketilojn.

BULTENO. ~~La lasta numero, kvankam presita per la malnova maŝino,~~ estis pli legebla.

Prezo de la ofseta presado:

Stencilo 8 Frankoj.

Paĝo 5 centimoj

Por 280 bultenoj : 253,80 F.

- 8 stenciloj x 8,00 F = 64,- F
- 280 folioj x 0,05 F = 14,- (Frontpaĝo)
- 840 folioj x 0,12 F = 100,80
- Sendkostoj 0,30 F x 250 poŝtmarkoj = 75,00

Sume → 253,80 F por 4 paĝa bulteno

La kunveno fermiĝis je la I2a horo.

---

# LINGVA ANGULO

## ĈU MERKATO, ĈU BAZARO ?

En "EL POPOLA ĈINIO" :

Oni montras ~~bildon~~ bildon , kun tiu teksto sube:

" La komunumanoj de popola komunumo portas legomojn al la bazaro."

Sekvas artikolo:

"Prosperas la pekina merkato

En la merkatoj de nia ĉefurbo regas vigloplena prospereco.

Ĉu en grandaj magazenoj aŭ en bazaroj , ĉu en ĉiovendejo , ĉu...., ĉie abundas variaj produktaĵoj"

Oni ne konfuzu "merkato" kaj "bazaro"

BAZARO: loko, kovrita aŭ ne, kie estas multaj diversaj vendobudoj aŭ vendotabloj (PIV) Placo de l'bazaro, fiŝbazaro, legombazaro, superbazaro, pulbazaro (en Parizo

MERKATO: europa merkato, merkato de la kotono, serĉi novajn merkatojn.

---

**ne forgesu vian jaran kotizon al U.N.E.**

**7,00 fr. minimume. Dankon !**

**c.c.p. : Rouen 283 40 H**

## L E T E R O E L . . . PORT OF SPAIN ( Trinidado )

Jen la sekvo de la vojaĝo de nia amiko Johano Francisko , kiu pasintfoje skribis el Dakaro . . .

... En Dakaro , mi serĉis ŝipon por trairi Atlantikon, kaj iri en Sudan Amerikon . Estis tre malfacile . Mi estis senespera , kaj mi pensis iri en Las Palmason ( Kanarioj) kie, - oni diris al mi - , estas multe pli facile trovi ŝipon ; dume , mi estis malsana (renaj kolikoj ) Mi travivis malbonajn momentojn : malsana kaj sen ŝipo ...

Sed, antaŭ ol forlasi Dakaron,mi volis vidi ĉu eblis trovi velŝipon ĉar,de Novembro ĝis Majo, estas taŭga epoko por trairi Atlantikon tajdoj estas favoraj . Miraklo ! mi trovis ... Estas franca velŝipo nomita " Au Bonheur des Dames " ( Kia bela nomo ! ) Ĝi estas longa je 13 metroj , kun unu masto (estas kutro) la ŝelo estas verda,tipo Galapagos 43 .Konstruita de du Bretoĝoj ,Jean-Yves kaj Jean-Yvon , ili serĉis pasaĝerojn ĉar ili havis grandan velŝipon kaj ...malmulte da mono .

Mi enloĝiĝis la 20an de Novembro por helpi je pretigo de la velŝipo aĉetado kaj ordigo de porvivaĵoj, akvo,ktp.; kaj konatiĝi kun la teamo ĉar ni estis ok personoj .

Dimanĉon la 27an de Novembro,ni forlasis Dakaron al Verdakabaj Insuloj . Ni vidis la sudajn insulojn ; Maĵo malproksime . Post kvar tagoj en Prĭa,ni volis vidi Fogon insulon ĉar oni trovis altan vulkanon proksimume 3 000 metrojn , sed, en San Felipe, policanaro ne volis ke ni restadu ĉar ni ne havis registaran permeson . En Brava insulo ni trovis trankvilan golfeton..... sen policanoj . Ni fiŝis langustojn : il estas tre , trebonaj ; kaj ni vizitis fiŝistovilaĝon .

Verdakabaj Insuloj konas grandan sekecon , ne pluvis de kvin jaroj . En tiuj insuloj , estas oazoj . La grundo estas nuda, sen arboj . La loĝantoj estas certe ja malriĉaj,sed tre gastamaj,kiel la Afrikanoj. La Verdakabanoj (en franca lingvo Capverdiens) estas mestizoj .

Ni renkontis en tiu golfeto konatan navigiston : Gérard Pesty kiu, kun ŝia velŝipo "Architentis" ,alvenis la 6an en Newporto por la transatlantika kurkonkurso 1972 , kaj kiu organizis ekspedicion en la Delto de Orenoks (Venezuelo) .Li skribis libron " La croisière verte "

Bedaŭre, ni forlasis Bravan Insulon por Oceano,sed tie ĉi la Aventuro komencis . Dekkvin tagoj por trairi .-La unuaj tagoj mi havis iomda marmalsano ĉar la vento estis posta ; nur kelkaj mallongaj pluvegoj . La ĉefa aktiveco estis la kuirado .Ni havis la feliĉon fiŝi unu fiŝon ĉiun duan tagon ekzakte ,dum la tuta marveturo .Por fiŝi , oni metis fiŝfadenon trenita, kaj ni atendis ...

Ĉiu kuiris sian specialecon : mi kuiris spagetojn kun viandsaŭco. Ni manĝis multe kaj ni dikiĝis ; mi bezonis tion,ĉar mi maldikiĝis dum mia vojaĝo en Afriko . Oni legis,oni sunbruniĝis,oni dormis aŭ aŭskultis muzikon ; oni parolis kaj faris nenion , sed oni kòntemplis la maron , la ĉielon , la sunon ; kaj nokte la stelojn, la lunon ; ĉiu tago, ni vidis la lunon pli kaj pli granda ; estis plenluno dum la tago de Kristnasko.La plej bela spektaĵo estas la sunleviĝo kaj sunsubiro .

La 23an de Decembro,ni alvenis en Bridgetown en Barbado. Estas la insulo la plej orienta de Antiloj.La loĝantoj estas negroj kaj ili parolasla anglan lingvon.Estas tre turisma loko (Usonanoj kaj Kanadanoj ) . Ni ne ŝatis . La 28an de Decembro,ni forlasis Barbadon; la morgaŭon ni alvenis al Port of Spain ,ĉefurbo de Trinidado .Estas granda havenurbo ĉar en Trinidado oni trovis petrolon. La landanaro estas tre kosmopolita (negroj , hindoj, mestizoj , ĉinoj , blankuloj ...)

Nun mi devas forlasi " Au Bonheur des Dames " ĉar ĝi foriras al Granada insulo al Nordo , kaj mi volas iri al Brazilo..

.... Jam mi serĉas ŝipon ....

Ĝis baldaŭ , amikaĵoj ,

Johano Francisko

# VOĈDONILO

6

ROUEN 1978.

## Elekto de la Nova Estraro

La sorto elektis Srojn GIBAUX kaj QUILLAUD kiel elirantoj per la tria triono de la estraro elektita en Val de Saône.
Laŭstatute ili estas reelekteblaj, kaj estas denove kandidatoj. Ĝis nun ni ricevis neniun alian peton pri kandidatiĝo. Tamen vi rajtas anstataŭi unu nomon per alia, kondiĉe ke la koncerna persono akceptu esti kandidato.

Estas kandidatoj : Sro GIRAUX el LE HAVRE.

Sro QUILLAUD el GRAND QUEVILLY.

Se vi ne povas partopreni la ĝeneralan kunvenon en ROUEN, la 23an de aprilo, bonvolu resendi tiun voĉdonilon al :

Sro Pierre POTTIER , 21 allée des Roitelets 76190 YVETOT..

---

# RAJTIGILO

ROUEN, la 23an de Aprilo 1978a.

U.N.E.

Se vi ne povas partopreni la ĝeneralan kunvenon de U.N.E. en ROUEN bonvolu resendi tiun rajtigilon al Sro POTTIER 21 allée des Roitelets 76190 YVETOT, kune kun via voĉdonilo.

Mi, subskribinta (nomo), . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

ne povas ĉeesti la ĝeneralan kunvenon de U.N.E. Mi transdonas mian povon al :


Sinjor(in)o :

kaj petas lin /ŝin agi en mia nomo pri ĉiuj decidoj, kaj pri la baloto pri la elekto de la tria eliranta triono de la estraro.

Dato kaj subskribo :

(Super la subskribo, bonvolu permane skribi : "Bon pour pouvoir". )

---



en ROUEN 22/23 Aprilo 1978a... okazos... 7

NORMANDA FEDERACIO de U.F.E. +

# U.N.E. KONGRESO

+ SABATON la 22an de aprilo :

- ek de la 14a horo : akcepto de la kongresanoj en "Auberge de Jeunesse" 17 rue Diderot 76100 ROUEN.
- libera posttagmezo. Promenado tra la urbo
- diskutoj pri la estontaj planoj de la Esperanto-movado en la Normanda Regiono.
- ludoj, kantoj, aŭdado de E° diskoj.
- ekspozicio de la E° gazetaro.
- 19a horo : libera vespermanĝo.
- 20h30 : interfratiĝa vespero.
- : TEatro ESperanto de PArizo ludos por ni ĉerpaĵojn de la "Kalva Kantistino" de Ionesco.

+ DIMANĈON la 23an de aprilo :

- 9a horo : Apartaj kunvenoj por la Federacio Normanda de U.F.E. kaj Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj okazos por la reelektoj de la ambaŭ estraroj, de la kontrevizilistoj kaj por la loko de la ĝeneralaj kunvenoj de la Federacio kaj de U.N.E. venontjare.

  Komuna kunveno de la ambaŭ organizoj pritraktos :
  - la agadraportoj de la grupoj
  - agadplano por 1978/1979.
  - bulteno
  - renkontiĝojn : aŭtuna, Zamenhofa, printempa.
  - informado
  - diversaĵojn...
- 12h30 : - Komuna simpla tagmanĝo en la junulgastejo.
- Posttagmeze :
  - libera posttagmezo.
  - estrarkunsidoj de la novaj estraroj.
  - ludoj, kantoj ....
- 17a horo : Adiaŭa teo kaj festeto.

## PROGRAMO

.../...

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## ALIĜILO

NOMO : ANTAŬNOMO :

ADRESO :

Bonvolu [X] en la taŭga loko ! dankon !

* DATO de ALVENO

Mi venos sola ☐ Mi venos kun aliaj personoj ☐

Nombro da personoj....................... : ☐

☐ 1)- Mi alvenos sabate posttagmeze aŭ vespere.

☐ Mi tranoktos en la Junulgastejo. Nombro da personoj............. : ☐

☐ Mi ĉeestos la kunvenon, sed revenos hejmen por tranokti aŭ loĝos en hotelo.

☐ 2)- Mi alvenos nur dimanĉe matene

☐ Mi deziras partopreni simplan tagmanĝon dimanĉe por ............ : ☐ personoj

* DISTRA VESPERO

Mi intencas kanti, diri poemojn aŭ rakontojn. ☐

Mi intencas organizi ludojn aŭ teatraĵojn. ☐

Mi montros lumbildojn aŭ filmojn. ☐

☐ Aliaj sugestoj :................................

☐ Mi deziras vespermanĝi sabate en la memserva restoracio de la Junuldomo por ☐ personoj.

Mi konsilas al vi, fari fotokopion de tiu aliĝilo kaj kalkulo, kaj ĝin konservi.

DATO : SUBSKRIBO :

## KELKAJ PLIAJ INFORMOJ :

- **VESPERMANĜO SABATE** ; 1) eblas surloke kuiri manĝaĵojn per gasaparatoj de la Junulgastejo : oni mem devas prizorgi tion. Tie estas manĝilaroj, kaseroloj.....
  2) alia solvo : 400 metroj for de la Junulgastejo situas memserva restoracio de la Junuldomo de Rouen. Tie oni povas manĝi je malalta prezo. Bonvolu anonci vin antaŭe.
  3) aŭ fine, vi mem elektu restoracion en la ĉirkaŭaĵoj.

- **TRANOKTADO** : 1) en la Junulgastejo : komunaj dormejoj 6/8 litoj. Bonvolu kunporti littukojn aŭ dormsakon. Tamen oni povas lui surloke dormsakon je 4,00 Fr po nokto. Estas en nia kunvenejo multaj litkovriloj.
  La tuta domo estas varmigata, havas varmajn duŝojn kaj akvon.
  2) Vi povas kompreneble elekti, se vi deziras, dormĉambron en unu el la multnombraj hoteloj de Rouen. Sed oni nepre mem prizorgu tion.

  **ATENTU** : Por tiuj kiuj tranoktos en la Junulgastejo, la prezo de la matenmanĝo dimanĉe mateno estas entenata.

- **DIMANĈA TAGMANĜO** : Estos kiel kutime dum la renkontiĝoj de U.N.E., simpla sed bongusta tagmanĝo en simpatia etoso.

- **DIVERSAĴOJ** : - Bonvolu kunporti kantlibrojn, muzikinstrumentojn kaj bonhumoron.
  - El la stacidomo (dekstra riverbordo) vi povas kapti aŭtobuson n°12, rekte ĝis la haltejo "Rue DIDEROT" (maldekstra riverbordo)., 100m for de nia kunvenejo.
  - La Ruena Junulgastejo estas unu el la plej moderna el Francio. Ĝi situas en kvieta strato apude de la maldekstra riverborda urbo-centro : "Saint Sever".
  - Kaptu la okazon aplaŭdi niajn amikojn de la TEatro ESperanto de PArizo (TESPA) kiuj ludos por ni sabate vespere ĉerpaĵojn de la "Kalva Kantistino" de Ionesco.

Do venu multnombras, ni atendas vin en la Junulgastejo de Rouen 17 rue Diderot sabaton la 22an kaj dimanĉon la 23an de Aprilo !

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii, kaj sendi kiel plej eble rapide

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:

Resendu la aliĝilon al :
Pierre LEMARCHAND
43 rue Dessaux 76100 ROUEN
Tel. : (35) 72 71 17.
kune kun la antaŭpago. Dankon !

**ANTAŬPAGO** : Kiu aliĝas, tiu antaŭpagu la tuton. En okazo de lastminuta nepartopreno, la kasisto repagos al vi, escepte de la aliĝkotizoj. (6Fr po persono.)

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : C.C.P. ROUEN 283 40 H

Mi sendas ĉi kune bankĉekon aŭ poŝtĉekon je la valoro de : ............ Fr.

Por :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1) | Aliĝo<br>Komuna tagmanĝo dimanĉe<br>uzo de la ekipaĵoj de la Junulgastejo. | = 25,00 Fr | X | = |
| | aŭ | | | |
| 2) | Aliĝo<br>Komuna tagmanĝo dimanĉe<br>Tranoktado en la Junulgastejo + matenmanĝo dimanĉe | = 40,00 Fr | X | = |
| 3) | Kiel "1" por infano malpli ol 15jaraĝa. | = 20,00 Fr | X | = |
| 4) | Kiel "2" por infano malpli ol 15 jaraĝa | = 35,00 Fr | X | = |
| 5) | Subtenkotizo .................................. | | | = |

**SUME** : ............